

Johann Wolfgang von Goethe,
 Kanto de la spiritoj super la akvoj
tradukita de Karl Jost

La homa animo
 similas al akvo,
 de l' ĉielo ĝi venas,
 al ĉielo ĝi iras,
 kaj devas denove
 reveni al tero,
 daŭre ŝanĝante.

Torente de l' alta
 kruta rokvando
 pura la akvo
 ĉarme dissprucas
 je nubondoj
 sur glatan rokon,
 kaj facilkviete
 fluas nubvuale,
 murmure
 en la profundon.

Se staras rifoj
 al falo kontraŭe,
 ĝi ŝaŭmas kolere,
 ŝtup-al-ŝtupe
 abismen.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
 Gesang der Geister über den Wassern

Des Menschen Seele
 Gleicht dem Wasser:
 Vom Himmel kommt es,
 Zum Himmel steigt es,
 Und wieder nieder
 Zur Erde muß es,
 Ewig wechselnd.

Strömt von der hohen,
 Steilen Felswand
 Der reine Strahl,
 Dann stäubt er lieblich
 In Wolkenwellen
 Zum glatten Fels,
 Und leicht empfangen,
 Wallt er verschleiernd,
 Leisrauschend
 Zur Tiefe nieder.

Ragen Klippen
 Dem Sturz entgegen,
 Schäumt er unmutig
 Stufenweise
 Zum Abgrund.

...

Nun malrapide
ĝi trarampas la valon,
kaj en glata la lag'
respegulas sin.
ĉiuj la astroj.

Vent' estas al ondo
ĉarma kunulo;
vent' kirlas el fundo
saŭmantajn ondegojn.

Animo de l' homo,
vi similas al akvo!
Sorto de l' homo,
al vent' similas ja vi.

Traduko de la Germana poemeto "Gesang der Geister über den Wassern"
de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22)
en Esperanton de KARL JOST (*1876 – †1952).

Arg-504-989 (2010-01-11 12:54:14)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la revuo "Heroldo de Esperanto", nro 9 (1144), 27-a jarkolekto, de l' 1-a de junio 1951. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/spiritoj.htm>. S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danio, lars.kromann@mail.dk) enmetis ĝin tien. Karl Jost estis tre aktiva Esperantisto loĝinta en la svisa urbo Zuriko. Li estis kunfondinto de la Zurika Esperanto-Societo kaj verkis multajn tradukojn, lernolibron de Esperanto kaj aliajn Esperantaĵojn. Vidu ankaŭ la retejon www.planlingvoj.ch

Im flachen Bette
Schleicht er das Wiesental hin,
Und in dem glatten See
Weiden ihr Antlitz
Alle Gestirne.

Wind ist der Welle
Lieblicher Buhler;
Wind mischt vom Grund aus
Schäumende Wogen.

Seele des Menschen,
Wie gleichst du dem Wasser!
Schicksal des Menschen,
Wie gleichst du dem Wind!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemeto estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-504-988 (2010-01-10 17:18:40)